

Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

ARTIKOLOJ PETATAJ KUN KOLORAJ FOTOJ

Nia venonta numero en oktobro estos speciala --- kun koloraj fotoj. Sendu vian rakonton, precipe la somerajn spertojn, sed ne nur tiuteman, al la redakcejo, ĝis la 22a de septembro!

TIEL OKAZIS

HAMA-RONDA VESPERO EKSTRA

*la 20-a de julio, 15h00-17h00, ĉambro 401

Nia gasto estis s-ro Henning Sato von Rosen el Svedio, kiu ne volis prelegi pri specialaj temoj sed interŝanĝi komentojn aŭ demandojn libere en la facila etoso, kaj tion ankaŭ Hamarondanoj deziris kaj konsentis, t.e. ĝui Esperantan konversacion facilmaniere. Estis bona okazo,

ke ĉiuj ĉeestintoj (entute 15 membroj) parolis kaj demandis sen troa hezito. Iuj parolis volonte kaj longe. Mi elkore dankas ĉiujn, precipe s-ron Henning pro lia bona gvidado kaj interesaj epizodoj. S-ro Iwaya kaj s-ino Murata multe klopodis por la sukceso de ĉi-foja kunveno. Aida Yayoi



fotita de s-ro Mizro IWAYA

- Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

NIAJ PLANOJ

RUDIMENTA KURSO DE OKTOBRO

*de la 3-a de oktobro, 20:00-21:30, en unu el la ĉambroj

Ĉi-foje ni havos kurson en vesperaj horoj.

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

*Regula Klaso en merkredo por legado de "Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj".

EN TOKIO -- LA 100-A JAPANA ESPERANTO-KONGRESO

*de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro, en la Halo Funabori-Turo en Tokio

Ni havos la jubilean kongreson Tokio. Ni Jokohama Esperanto-Rondo oferis tricent mil enojn por la sukcesigo de la kongreso.

En la kongreso, nia rondo havos standon, por ekspozicii kaj vendi niarondajn produktojn.

La korusa grupo kantos kelkajn esperantajn kantojn en la Amika Vespero de la kongreso.

Cetere, nia rondano s-ro Suzuki Keiichiro estas la prezidanto de la kongreso, estante la prezidanto de Japana Esperanto-Instituto. Ĝi havos ĉ. 600 kongresanojn, inkluzive de pli ol 40 el ekster Japanio.

NI EKSPOZICIOS EN LA INTERNACIA FESTO DE JOKOHAMO

*la 19-a kaj 20-a de oktobro, de 10h30 ĝis 16h00 ĉiutage, en la parko "Zoo-no-hana" en Jokohamo

Ankaŭ ĉi-jare okazos la Internacia Festo de Jokohamo, evento en kiu multaj organizoj prezentos sin en tendoj. Ni ekspozicios pri Esperanto.

ZAMENHOFA FESTO EN KAWASAKI

*la 15-a de decembro posttagmeze, en la Internacia Centro de Kawasaki

Detalo poste fiksota.

NOVAĴOJ JOKOHAMAJ

La Urbestro de Jokohamo en la dua mandato

En la 25-a de aŭgusto okazis la elekto de la urbestro de Jokohamo, kaj el 3 kandidatoj, s-ino HAYASI Humiko [hajaŝi humiko] estis elektita, kiel la dua mandato por ŝi, unuafoje elektita antaŭ 4 jaroj. Ŝi akiris 82 procentojn el la voĉdonoj, do absoluta plimulto, dum la voĉdonintoj okupis nur 29 procentojn el la voĉdonrajtaj urbanoj; la elekta kampanjo ne estis tiom arda pro la forteco de la s-ino.

Unu el la kialoj de tiu forteco kuŝas en ŝia sukceso en la bonfarta kampo por patrinoj kaj infanoj. Por ke patrinoj laboru tage, necesas infanvartejoj, precipe infanvartejoj kvalifikitaj de la municipo. Antaŭ tri jaroj, tamen pli ol 1500 infanoj devis atendi vartadon en tiaj kvalifikitaj lokoj, kaj tiu nombro estis la plej alta, t.e. plej malbona en la japanaj municipoj. S-ino Hayasi klopodis nuligi tiujn atendantojn, kaj ja sukcesis atingi tion en la lasta aprilo.

El ŝia politiko por plimultigi la kapaciton de infanvartejoj, efikis inter alie,

- (1) permesis ke profitocelaj entreprenoj administru vartejojn.
- (2) iom mildigi la kvalifikan barieron,
- (3) provizi konsilanton al la patrinoj, por ke taŭga vartejo estu trovita.

Tia politiko, nun konata kiel jokohama metodo, estis laŭdita de la ĉefministro Abe, kiel unu el la bonaj modeloj multigi infannaskon.

(SIBAYAMA Zyun'iti)



BELETRO

Luno kaj foko (月と海豹)

verkis Ogaŭa Mimei
tradukis AIDA Kiyoshi

Norda maro arĝente glaciigis. Dum longa vintro la suno aperis malofte, ĉar ĝi ne ŝatis mornan lokon. Kaj la maro plumbe nubiĝis kvazaŭ okuloj de ĝuste mortinta fiŝo. Neĝis ĉiutage.

Unu patrino foko distrite rigardadis ĉirkaŭen kaŭrante sur la pinto de bankizo. La foko kun tenera koro rigardis ĉirkaŭen ĉiutage ne forgesante sian amindan infanon perditan en frua aŭtuno.

“Kien tiu iris? Ĝi ankoraŭ ne aperis hodiaŭ.” La foko pensis tiele. Malvarma vento senĉese blovis. La foko, perdinte la infanon, sentis sin malĝoja, eĉ se ŝi vidis ion ajn. Ŝi fariĝis malĝoja vidante, ke la blua koloro de la maro tiam ŝanĝiĝis en tiun de arĝento kaj ke neĝo falis sur ŝian korpon.

La vento siblis. La foko ne povis ne petegi la venton. “Ĉu vi vidis mian amindan infanon ie? Demandis la malĝoja foko per larva voĉo. La furioza ventego momente ĉesigis blovadon demandite de la foko. “Sinjorino foko, ĉu vi ĉiutage tiel kaŭras tie rememorante la perditan infanon? Mi ne komprenas kial vi ĉiam restas senmove tie? Nun mi batalas kontraŭ neĝo. Dum kelkaj tagoj mi daŭre luktis vivriske kontraŭ la neĝo pensante ĉu la neĝo okupos la maron aŭ ĉu mi okupos la neĝon. Nu, mi ne vidis vian infanon, kvankam mi kuris ĝis ĉiu angulo de la maro. La infano verŝajne ploras kaŝiĝante en la ombro de glacio... De nun mi atente serĉos la infanon.” “Vi estas bonkora. Mi pacience atendos vin ĉi tie, se vi estas malvarma kaj frosta. Kiam vi ĉirkaŭkuras sur la maro kaj trovos mian infanon, kiu ploras serĉante la patrinon, bonvolu sciigi min pri tio. Mi iros ien ajn renkonte al mia infano transsaltante la monton de glacio...” Diris la foko kun larmoj en siaj okuloj. La vento turnis sin al la foko rapidante la vojon kaj diris, “Sed sinjorino foko, aŭtune fiŝboato venis ĉi tien kaj se la infano estus kaptita de homo, ĝi ne reirus hejmen. Ĉi-foje mi serĉos ĝin ĝis ĉiu angulo

kaj se ne trovos, rezignu ĝin.” La vento rapide kuris forlasinte la vortojn.

Poste la foko laŭte blekis malĝoje. La foko ĉiutage atendis la informon de la vento. Sed la vento, kiu promesis al ŝi reviziton, tute ne revenis ĉi tien. “Kien la vento iris?” Ĉi-foje la foko ne povis ne zorgi pri la vento. La vento daŭre senĉese blovadis unu post alia. Sed la foko ne trovis, ke la sama vento ankoraŭfoje blovas sur ŝin.

“Al kiu direkto vi iros de nun?” La foko demandis la venton preterpasantan antaŭ ŝi mem.

“Nu, mi ne povas diri kien mi iros. Mi nur akompanos miajn amikojn, kiuj antaŭen iros” –

respondis la vento. “Mi petis helpon de la vento, kiu iris jam frue antaŭen. Mi volas aŭdi la respondon...” – diris malĝoje la foko. “Do, la vento, kiu promesis al vi, ankoraŭ ne revenos ĉi tien. Mi ne scias, ĉu mi renkontos ĝin. Sed se mi renkontus ĝin, mi transdonus vian mesaĝon al ĝi.” Dirinte tion la vento foriris ien. La maro estis grize kaj kviete dormanta. La neĝo batalis kontraŭ la vento kaj dispeciĝis kaj disflugis.

Tiele sidante senmove la foko rememoris, ke iam la luno demandis prilumante ŝian korpon, “Ĉu vi estas soleca?” Tiam la foko konfesis al la luno suprenrigardante la ĉielon, “Mi estas soleca, tre soleca!” La luno fiksigardis ŝin kun ĉagrena mieno, sed baldaŭ kaŝiĝis malantaŭ nigra nubo. Tion la foko rememoris. La soleca foko tage kaj nokte rememoris sian infanon, kaj atendis la informon de la vento kaj pensis pri la luno kaŭrante sur la pinto de bankizo.

La luno nepre ne forgesis la fokon. Diference de la suno, kiu vojaĝas rigardante homplenajn stratojn kaj subenrigardante florantajn kampojn, la luno daŭre vojaĝis rigardante solecan urbon kaj nigran maron. Kaj la luno vidis la mizeran vivstaton de la homo kaj la mizeran staton de bestoj, kiuj blekis pro malsato.

Kiam la luno vidis, ke la patrino foko, kiu

perdis la infanon, blekis pro ekscesa malĝojo ne dormante la tutan nokton sur la pinto de bankizo, ĝi elkore kompatis ŝin, kvankam ĝi tiom alkiutimiĝis al multaj malĝojoj en la mondo por senti ilin seriozaj.

Nenio plezurigis la koron de la foko, ĉar ĉirkaŭ la maro estis mallume kaj malvarme.

“Ĉu vi estas soleca?” Kun tiuj vortoj la luno malmulte alparolis la fokon. Sed la foko petegis la lunon suprenriagardante la ĉielon, ke ĝi imagu ŝian veran malĝojon en la koro. Sed la luno povis fari nenion per si mem.

De tiu nokto la luno volis iel konsoli tiun fokon. Iun nokton la luno rapidis la ĉielan vojon subenrigardante la grizan maron kaj pensante kiel la foko fartas. Ankoraŭ la vento estis malvarma kaj la neĝo malalte flugis preterpasante la bankizon.

Ankaŭ tiun nokton la malĝoja foko kuŝis kaŭre sur la pinto de bankizo. “Ĉu vi estas soleca” – afable demandis la luno. La foko aspektis iom pli svelta ol antaŭe. Kaj malĝoje suprenrigardante la ĉielon la foko diris, “Soleca! Mia infano ne estis trovita.” La foko alparolis la lunon.

La luno rigardis la fokon kun pala mieno. La lumo kolorigis pale la korpon de la foko. “Mi vidis ĉiun lokon en la mondo. Ĉu mi parolu amuzan rakonton de fora lando? –proponis la luno al la foko. La foko skuis la kapon, “Bonvolu sciigi al mi kie mia infano estas. La vento, kiu promesis serĉi ĝin, respondis nenion al mi. Se vi scias ĉion en la mondo bonvolu sciigi al mi kie mia infano nun vivas. Mi ne volas aŭdi alian aferon.” –petegis la foko al la luno.

Aŭdinte tion la luno mutiĝis. La luno ne scias kion ĝi respondos. En la mondo, kie infanoj estis perditaj, logitaj, kaj mortigitaj, troviĝas tie kaj ĉi tie tiel multaj malĝojaj aferoj, ke la luno ne povis rememori ĉiun aparte. “Povus mi trovi fokojn, kiuj perdis kelke da infanoj en ĉi tiu norda maro. Sed vi tre malĝojas, ĉar vi profunde karesas vian infanon. Pro tio mi simpatias al vi. Baldaŭ mi kunportos ion, kio plezurigos vin...” –diris la luno kaj kaŝiĝis malantaŭ la nubo.



La luno nepre ne forgesis tion, kion ĝi promesis al la foko. Iun vesperon gejunuloj dancis en floranta ĝardeno fajfante kaj tamburante. La luno malsuprenrigardis la scenon el la ĉielo. Ĉiuj gejunuloj estis paŝtistoj. Ĉiuj devis kulturi kampon kaj rizejon, ĉar tiu ĉi regiono estis jam varma. Ili laboris tuttage en la kamparo kaj vespere dancis sub la luno kaj forgesis laciĝon de tiu tago.

Viroj reiris hejmen sub obskura luno pelante bovojn kaj ŝafojn. Dume virinoj ripozis en la floroj. Kaj ili baldaŭ dormetis ebriiĝante pro la aromo de floroj kaj milda venteto.

Tiam la luno trovis malgrandan tamburon postlasitan en la herbejo kaj pensis kunporti ĝin al la kompatinda foko. Neniu rimarkis, ke la luno prenis la tamburon etendante la brakon. Tiun nokton la luno vojaĝis al norda maro kunportante la tamburon.

La norda maro ankoraŭ arĝente glaciigis kaj blovis marvarma vento. Kaj la foko kuŝis kaŭre sur la pinto de bankizo. “Nu, mi kunportis la promesitan aĵon por vi.” –diris la luno kaj transdonis la tamburon al la foko. Ĝi ŝajne plaĉis al la foko. Kelkajn tagojn poste kiam la luno hele brilis super la maro, la glacio komencis degeli kaj la sono de la tamburo, kiun la foko ludis, aŭdiĝis el inter marondoj.

Pri la aŭtoro:

Ogaŭa Mimei (1882~1961) estis novelisto kaj infanliteratura verkisto. Li naskiĝis en la urbo Takada de la gubernio Niigata. Lia vera nomo estis Ogaŭa Kensaku.

En 1905 li diplomiĝis el la sekcio de la angla literaturo de Ŭaseda Universitato kaj li komencis verki novelojn sub la gvido de verkistoj Cubouĉi Ŝjoojoo kaj Ŝimamura Hoogecu. Du el plej famaj infanoveloj estas “La Ruĝa Kandelo kaj Marvirino” kaj “Luna nokto kaj Okulvitroj”. Li estis la fondinto de modera porinfana literaturo en Japanio.